

La Merkato

ISSN 0941-9306

IKEF-kunvenoj dum la Universala Kongreso en Vilnius

Niaj membroj Stasys Kruzinauskas kaj Zenonas Sabalys planas:

- kunsidon de esperantistaj komercistoj (laŭ origina ideo de Wang Tianyi) je sabato 23 julio, je la 21a horo en iu kafejo proksime de la kongresejo;
- viziton al Industria, Komerca kaj Metia Ĉambro de Vilnius je ĵaŭdo 28 julio, je la 14a horo.

Detalojn, kaj ankaŭ la daton de la ĝenerala kunveno de IKEF, aperos en la rubriko 'Aktuale' de www.ikef.net kaj estos konigataj surloke.

Enhavo

Eŭropa Unio	3
Novaj membroj - Novaj adresoj - Membro serĉata	3
Esperanto en Ekonomio (IHK Freiburg)	4
Konstru-forumo - Photomax	6
Nova Mondo	8
Problemo de ekonomiaj terminoj	9

La Merkato (LM) (ĝis numero 26: *Laŭokaza Novaĵletero*) estas revuo de IKEF. Ĝi aperas kvaronjare (jan-apr-jul-okt) kaj servas al la membraro kiel komunikilo. Redaktoro: Roland Rotsaert. Limdato: mezo de la monato antaŭ apermonato.

Estraro de IKEF: S-ro Franz Josef BRAUN, Prezidanto kaj Ĝenerala Sekretario; S-ro Roland ROTSAERT, Financa Konsilanto; S-ro Silvio KNISS MATES; D-ro Rainer KURZ; Prof. Ooba Atsua; S-ro WANG Tianyi **Revizoro por la financa raporto:** D-ro Gianfranco Polerani. **Centra sidejo:** Ĉe s-ro F.J. Braun, Hornisgrindestr. 8, D-77815 Bühl, Germanio.

Financa sidejo kaj membrara administrado:

Ĉe s-ro Roland Rotsaert, Visspaanstraat 97, B-8000 Brugge, Belgio,
telefono/fakso/respondilo: +32-50-330004; retpoŝto: roland.rotsaert@pandora.be.

La jara **membrokoto** estas 15 eŭroj (EUR) por landoj laŭ UEA-kategorio 'A' ('riĉaj landoj') kaj 10 EUR por landoj laŭ UEA-kategorio 'B' ('malriĉaj landoj'). Tarifo por komuna membreco de IKEF kaj TAKE: 27 EUR (kat. A) aŭ 18 EUR (kat. B) jare. Egalvaloro en konverteblaj valutoj (ekz. usona dolaro - USD) kaj internaciaj respondkuponoj (IRK - kun stampo de eldoninta poŝtoficejo) estas akceptata. Kurzoj estas proksimume 1 EUR = 1 USD = 1,20 IRK. Dumviva membreco akireblas per unufoja pago egalvalora al 20-obla membrokoto. Por pago per kreditkarto kaj/aŭ aŭtomata jara pago sendu instrukcion al Flandra Esperanto-Ligo (FEL). Membroj kiuj aliĝas meze de la kalendara jaro pagu 1,5-oblan kotizon (t.e. por 18 monatoj).

Kontoj: - ĉe UEA kaj FEL: kodo *ikef-c*

- belga poŝtekkonto: n-ro 000-1592629-83 (IBAN: BE14 0001 5926 2983, BIC: BPOTBEB1)

Perantoj

Internacie: Flandra E-Ligo (fakso +32-3-233.54.33, retpoŝto financoj@fel.esperanto.be)

Brazilo: Silvio KNISS MATES (silvio@siscobras.com.br; Banco do Brasil SA, Branĉo 3174-7, konto 6999-x, RS 40,00)

Ĉinio: S-ro WANG Tianyi, Xi'an Jiangong-lu 3, CN-710043 Xi'an, telefono + fakso 0086-29-2232952, retpoŝto komerco@public.xa.sn.cn

Francio: S-ro François-Xavier GILBERT, 33, rue Louvière, F-55190 Void-Vacon (CCP 1275-89 L Nancy), telefono kaj fakso +33(0)3.29.89.82.15, retpoŝto efikso@wanadoo.fr

Germanio: S-ro F. J. BRAUN, Hornisgrindestr. 8, D-77815 Bühl (Volksbank Bühl, n-ro 713120, BLZ 66291400), tel. +49-7223-942064, fakso 942065, retpoŝto f.j.braun@t-online.de

Hungario: D-ro GETHER I., Berenyi u. 8, H-1016 BUDAPEST, istvan.gether@office.ksh.hu

Italio: D-ro Gianfranco POLERANI, Viale G. Suzzani 2, I-20162 Milano, retpoŝto g.polerani@tiscalinet.it (poŝta konto 37485208)

Japanio: S-ro YAMASAKI Seikō, J-185-0014 Tōkyō, Kokubunzi, Higasi Koigakubo 3-18-12, retpoŝto syama@qf6.so-net.ne.jp (pĝk. n-ro 00160-3-253232, kotizo 2000 enoj)

IKEF-informoj en Interreto: www.ikef.org, www.ikef.info aŭ www.ikef.net

Eŭropa Unio

Serĉado de AVI-numeroj

Por komerco en kaj kun la EU necesas koni la AVI-numeron de la partnero (AVI = aldonvalora imposto; angle VAT, france TVA) kaj esti certa ke tiu numero ankoraŭ validas. Je http://www.europa.eu.int/comm/taxation_customs/vies/nl/vieshome.htm eblas kontroli tion ('nl' estas la kodo de la nederlanda lingvo; enigu vian lingvokodon.) Elektu la membro-ŝtaton kaj entajpu la numeron. Iom poste venos la konfirmo pri la valideco.

Oficialaj gazetoj

Foje necesas kontroli oficialan dokumenton, ekzemple leĝon, de iu lando. Estas informoj je <http://forum.europa.eu.int/irc/opoce/ojf/info/data/prod/html/gaz.htm> pri ĉiuj oficialaj gazetoj de la EU. Granda parto de la enhavo estas senpage rete konsultebla.

Nova membro

343. S-ro José Roberto Alves de Albuquerque, Rua Teodoro de Paiva, 166 - Luciano Cavalcante, BR-60821-200 - Fortaleza – Ceará, Brazilo, roberto.alves(a)cbcb.gov.br

Nova adreso

5. Per Hagemann, Banevej 6, Illebojle, DK-5900 Rudkøbing, perhag(a)tdcads.dk
75. Prof. Atsuo OOBA, JP-164-0013 Tokyo, Nakano-ku, Yayoicho 1-14-12-601

Novaj retadreso

14. F.X. Gilbert: efikso(a)wanadoo.fr
51. Michael Cwik: Michael(a)Cwik-online.net

Membro serĉata

Dum la pasintjara UK en Pekino aliĝis jena membro:
336. S-ro WU Xiangming, Fanxiang-Xi-lu 618-hao, Minhang-Qu, 201100 Shanghai

Evidentiĝis ke tiu adreso estas erara. Ĉu iu leganto kapablas havigi la bonan adreson?

(rr)

Esperanto en ekonomio

Prelego antaŭ la Junaj Ekonomiistoj de la Ĉambro pri Industrio kaj Komerco Freiburg (Wirtschaftsjunioren der IHK Freiburg) je 20 aprilo 2005

Nia membro d-ro Achim HORNECKER el Freiburg, Germanio (IKEF 337), iniciatis prelegon "Esperanto en ekonomio" (Esperanto in der Wirtschaft) antaŭ la Junaj Ekonomiistoj en la Ĉambro pri Industrio kaj Komerco (germane: Wirtschaftsjunioren in der Industrie- und Handelskammer, IHK) Freiburg im Breisgau, sudokcidenta Germanio. Li mem estas softvaristo kaj memstara entreprenisto en Freiburg kaj membro de tiu grupo Junaj Ekonomiistoj. Cetere same kiel IKEF estas faka asocio de UEA, tiel ankaŭ la Junaj Ekonomiistoj estas parto de internacia supera organizaĵo, nome *JCI Junior Chamber International* (www.jci.cc).

Por la prelego Hornecker gajnis nian prezidanton Franz Josef BRAUN (IKEF 4). Venis al la okazaĵo entute 20 personoj, duone el la Junaj Ekonomiistoj, duone aliaj personoj interesitaj pri Esperanto kaze de publika reklamo por tiu prelego.

Salutis la ĉeestintojn s-ro Ulrich WIENER, estro de la laborcirklo por internaciaj aferoj de Junaj Ekonomiistoj. El Ĉinio venis salutvortoj de s-ro Cheng Yonghua: "Karaj gesamideanoj: Saluton! Kiam okaze de via ekonomia kunveno, kiel membro de Ĉina Esperanto-Ligo malproksime el oriento mi elkore gratulas al la aranĝo sukceson....". Kiel enkondukon la afergvidantino de la Germana Esperanto-Asocio, d-ro Ursula NIESERT prezentis al la ĉeestintoj iom de la historio kaj gramatikaj reguloj de Esperanto.

Komence de sia prelego, Braun klarigis la celojn, laborkampojn kaj taskojn de IKEF. Al tio ne nur apartenas la internacia komercado surbaze de la lingvo Esperanto, kion faradas kelkaj IKEF-membroj, sed ankaŭ la eldono de vortaroj por la kampoj ekonomio kaj komerco, verkado de fakaj artikoloj en la Esperanto-gazetaro, tradukado por entreprenoj inkluzive reklamanoncoj por tiuj en Esperanto. Kio koncernas tiujn lastajn, Hornecker aranĝis antaŭ kaj post la prelego per lumprojekciilo daŭran montradon de kolektaĵo el tiaj reklamanoncoj aperintaj en MONATO (www.monato.net).

Rilate al la internacia komercado per Esperanto, referinto Braun koncedis ke tio ne aŭ apenaŭ okazas en mondvastaj entreprenoj. Tie regas la angla. Esperanto havas nur ŝancojn en malgrandaj entreprenoj aŭ en niĉoj, kiam la angla estas ne aŭ malbone regata aŭ pro politikaj kaŭzoj maldezirata. Plej multe niaj ĉinaj esperantistaj komercistoj uzas Esperanton en sia negocado, aparte kun aliaj aziaj landoj, kun suda Ameriko (precipe Brazilo) kaj Afriko.

Speciala parto de ekonomio estas la turismo. Ekzistas turismaj firmaoj kiuj organizas vojaĝojn tra aliaj landoj nur por esperantistoj, aŭ kelkfoje miksitaj kun ne-esperantistoj. Ĉiukaze la ĉiĉerono en tiuj vojaĝoj devas regi Esperanton. Braun atentigis ankaŭ pri la turismo okaze de la Universalaj Kongresoj, kion UEA mem organizas helpe de vojaĝ-entreprenoj kaj hoteloj en la kongreslando.

Kiel plian specialaĵon li menciis la nomdonadon por produktoj aŭ markoj. Kiel ekzemplojn li menciis Mirinda (limonado), Lupo, Vento, Cielo (aŭtomobiloj), Movado (horloĝoj), Integriilo (softvaro). Pro la ofta troa registigo de anglaj nomoj fare de la entreprenoj, tiaj liberaj nomoj rariĝas. Tial oni kreskante preferas belsonajn esperantajn nomojn. Interesa afero tiurilate estas grandega konferenca hotelo kun la nomo ESPE-RANTO, kiu estas konstruata kaj en aŭgusto 2005 malfermiĝota en la germana urbo Fulda.

Franz Josef Braun menciis ankaŭ la partneran organizaĵon TAKE (Tutmonda Asocio de Konstruistoj Esperantistaj), kiu unuigas la esperantofonajn fakulojn de ĉiuj fakoj de konstruado. Krome la prezidanto parolis pri nia membro s-ro MIYOSHI Etsuo (IKEF 270) el Japanio. Estante sukcesa entreprenisto en la kompanio SWANY por sportgantoj kaj bastonvalizoj, li elspezas rimarkindan parton de la kompania profito por reklamo por Esperanto per seriozaj artikoloj en grandaj eŭropaj gazetoj. Li opinias la nunan unuigantan Eŭropon mondoparto plej bezonanta Esperanton.

Fine de sia prelego kaj kiel danko por veno, Braun donacis al ĉiuj ĉeestintoj paron da laborgantoj kun surskribo "Esperanto". Krome dum la posta sandviĉa bufedo, al kiu Achim Hornecker invitis ilin, oni ĝuis "Esperanto"-vinon de la alsaco vinproduktanto Philippe Gocker. Per tio la aranĝo estis vera pruvo pri la utilo de nia lingvo!

FJB

Fotoj dum kelkaj monatoj videblas je www.ikef.org, rubriko 'aktuale' aŭ rekte je <http://users.pandora.be/ikef/aktuale.html>.

Nova E-retpaĝo de Ĉina Universitato de Fremdaj Aferoj kaj Ekonomio

Ĉina Universitato de Fremdaj Aferoj kaj Ekonomio en Pekino havas retejon kun pluraj lingvoj, inkluzive Esperanton. Nun la esperanta paĝaro estas renovigita. Bonvole vizitu: <http://www.bjaaa.com/esperanto/index.htm>.

Novajletero: "Konstru-Forumo" por arkitektoj kaj konstruistoj

Jan Werner estas unu el la plej konataj esperantistaj terminologoj en teknika tereno. Liaj plej konataj verkoj "Terminologia Kurso" (1986) kaj "Terminaro de betono kaj betonistaj laboroj" (2002) estas troveblaj en la Scienc-Teknika E-Biblioteko ĉe <http://www.eventoj.hu/steb/>.

Por kunagordi al agadon de esperantistaj arkitektoj kaj konstruistoj kaj por ellabori la fakan terminologion en la konstruata tereno li lanĉis fakan bultenon kun la nomo "Konstru-Forumo" por la kunlaborantoj kaj interesigantoj.

S-ro Jan Werner volonte akceptas la sinanoncojn de interesigantoj por partopreni la komunan laboron.

Lia retadreso: [werne\(at\)tiscali.cz](mailto:werne(at)tiscali.cz); fonto: "Ret-Info", <http://www.eventoj.hu>.

Photomax

Saveyourpics (www.newbusiness.saveyourpics.com), estas nova servo por enkomputili kaj enretigi fotojn kaj serĉas kunlaborantojn internacie. Rigardu je <http://dwp.bigplanet.com/ress> kaj www.photomax.com kaj/aŭ kontaktu min.

Anne Tilmont ([atilmont\(at\)xs4all.be](mailto:atilmont(at)xs4all.be))

Universala Kongreso en Vilnius

Proksimiĝas la Universala Kongreso en Vilno. En la kampo de faka kaj scienca agado estas antaŭviditaj pluraj aktivecoj:

1. Kunveno(j) de la subkomitato sk-7 al kiu ankaŭ vi estas invitata,
2. Faka forumo, en kiu reprezentantaj de fakaj asocioj povos prezenti sian asocion kaj oni povos interŝanĝi spertojn pri faka agado.
3. Terminologia forumo
4. Faka budo - libera giĉeto por fakaj asocioj
5. Terminologia forumo
6. Prelegoj de la IKU kaj kursoj de AIS-IKU

Amri Wandel

Nova Mondo

Finfine, mi povas diskonigi ke Nova Mondo jam estas registrita entrepreno. Baldaŭ mi informos detale pri nia nuntempa laboro kaj pri niaj planoj por la estonteco. (Vi povas koni kian grafikan markon ĉe www.novamondo.net/img/nm2.jpg.)

Kiel unuan oficialan oferton al esperanto-entreprenistoj, ni prezentas ĉi-sube tekston pri la kosmetikajoj sub la marko *Totus Amazon*. Ni serĉas importantojn el ĉiuj landoj, kun la jenaj karakteroj:

- profesia sinteno;
- preta pliigi la agadon per aliaj varoj/negocoj ĉu por importado ĉu por eksportado;
- fidindeco;
- prefere ni pritraktos kun entreprenoj (malpli kun individuoj);
- la bankoj por pagado de fakturoj devas esti unuarangaj;
- la kondiĉoj por importado kaj eksportado estos pritraktataj spefice laŭ ĉiu kazo.

Prezento de Totus Amazon

Vojaĝu profunden en la misteran kaj ĉarman universon de la Amazonia arbaro – unu el pli grandaj kaj pli riĉaj biodiversecoj en nia planedo. Faru kune kun ni tiun ekscitan vojaĝon ene de la vivoplena, kolora, ekzotika mondo de semoj, de naturaj oleoj kaj botanikaj ekstraktoj kun aromoj de praava magio kaj saĝeco. Provu esti nature bela kun la kosmetika kolekto Totus Amazon. Sentu la fluan energion de niaj aromoj kaj eniru la Amazonian indiĝenan spiriton, praktikante unuecon kun la patrino Tero kaj kun ĉiuj iliaj popoloj.

Ekvilibra korpo - kunligita animo

Nutru vian korpon kun riĉaj, moligaj kremo kaj malsekigas kaj plibonigas la naturan reviviglon de ĉeloj, lasante vian haŭton sana kaj flata al la tuŝo. Vekiĝu viaj sentoj kaj konatiĝu kun via interna estulo, malstreĉante kaj energigante vian spiriton kun senegalaj kaj inspirigaj parfumoj. Malkovru, pere de Totus Amazon, la veran esencon de bona farto.

Ĝuu nian vizion

Totus Amazon havas respondecon por socia ŝanĝo. Ni apogas vivtenantajn komercajn interrilatojn kun lokaj komunumoj, laboristoj kaj metiistoj celante la konstruon de vivteno kun respekto kaj digno, kuraĝigante novigojn kaj povo-donantan decido-eblecon. Konscio de nia interdependa rilato kun la Naturo kaj kun la popoloj loĝantaj en tiuj landoj, motivigis nin investi en senegalaj kaj kreivaj manfaritaj pakumoj uzantaj fibrojn, atestita ligno kaj reuzontaj kaj reuzitaj materialoj. Ni celas per senlima peno pli justan mondon. Socia respondeco estas parto de nia laboro.

Tradicio, spertolerteco kaj inspiremaj partneriĝoj

Ni ofertas kvaliton kaj novigon en apotekaj produktoj kaj kosmetikoj pere de tradicio konstruita de laborego kaj spertolerteco. Ni kredas ke fortaj partneriĝoj estas unu el la bazaj elementoj por sukceso kaj atingo de celoj. La Teknika kaj Skiza Centro, ĉe Universitato de Braziljo, kaj la Brazila Apoganta Servo por Etaj kaj Malgrandaj Entreprenejoj – SEBRAE, fama nacia institucio por trejnado de entreprenistoj serĉantaj vivtenantajn evoluigajn praktikojn, estas ambaŭ ekzemploj de partneroj envolvitaj kun niaj konceptoj.

Fabricio Valle (fabriciovalle(a)novamondo.net)



nova mondo

D-ro Zlatko Hinšt (zlatko.hinst(a)hznet.hr):

Problemo de signifoj de ekonomiaj terminoj en Fervoja Terminaro (UIC Railway Dictionary)

Enkonduko

Analizi la oficialan vortaron «Fervoja Terminaro» (UIC Railway Dictionary) de Internacia Fervoja Unio estas respektinda tasko de fakuloj. Precipe estas grave fari tion en kampo de ekonomio kaj ekonomiko. Kiel pliprecizigi, anstataŭigi aŭ enkonduki novajn terminoj en tiu celo? Speciala problemo de Esperanto estas la postrestado en difinoj de terminoj kiuj ekzistas kaj ekestas en la moderna ekonomio, inkludante negocado de fervojaj entreprenoj. Intenco de ĉi-tiu artikolo estas helpi en serĉado de pli bonaj solvoj en apliko de la Internacia Lingvo en praktika ekonomia vivo. Tiusence ĝi ampleksas problemon de precizeco kaj proponojn por gravaj ekonomiaj terminoj kiujn inkludas aŭ ĝis nun ne inkludas Fervoja Terminaro (FT). Grava maniero de analizo estas komparo de terminoj en kvar lingvoj: Esperanto, angla, germana kaj franca. Sed estas kelkfoje interese uzi kroatan lingvon por analizo kaj proponoj. En la artikolo oni montros la diversajn «logikojn» de la unuopaj lingvoj, kontraŭ(star)ecojn kaj finfine eblajn konsekvencajn solvojn de lingvaj problemoj. Pro tio estas necese kunligi FT en Esperanto kun plurlingva terminaro kaj kun specialigita terminaro – «Internacia komerca-ekonomika vortaro (en naŭ lingvoj)» (IKEF). Malgraŭ relative bone aranĝitaj fakaj fundamentoj por uzi terminojn restas problemoj. Unuavice, problemoj kiel proponi pli bonajn terminojn. Neevitebla neceso kun tio estas neologismoj, eviti uzadon de homonimoj kaj eluzi sinonimojn en nuancado de signifoj. Unuopaj angledevenaj terminoj ekestis en parto de naciaj lingvoj – kion fari kun ĝi? Ekonomiaj terminoj devas esti precizaj kaj klaraj en sia diverseco.

Lingva analizo de fakterminoj

En celo de lingva analizo kaj kvalitaj solvoj estas necese starigi tri tezojn. Tiuj tezoj povas helpi en solvado de la problemo de signifoj.

- Unua tezo estas ke Esperanto enhavas multajn homonimojn, sed malpli ol aliaj lingvoj. Neevitebla problemo estas enkonduko de novaj vortoj – neologismoj.
- Dua tezo estas ke sinonimoj ankaŭ ekzistas, sed la ebleco ke artefarita lingvo tion povas eluzi por nuancado de similaj aŭ diversaj signifoj donas al Esperanto novajn ŝancojn en (estonta) precizeco.
- Tria tezo estas ligita kun problemo de manko de adekvataj terminoj kaj ekzistado de nediferencigaj terminoj.

La plej bona maniero por lingva analizo estas unuopaj konkretaj kazoj. Sekvas ekzemploj por analizo.

- 1) Franca termino demande (kun diversaj signifoj per aldonado de aliaj vortoj), inkludante signifojn de fakkampoj, angla, germana kaj samaj esperantaj terminoj el UIC Railway Dictionary sub 1. kaj FT sub 2. (v. je Literaturo fine de la artikolo):
demande NT30 – enquiry – Stationsaufforderung - postulo stacia
demande d indemnité VS 20 – claim for compensation – Erstattungsantrag - kompens-postulo
demande de détaxe VS20 – claim for a reduction; claim for a refund – Erstattungsantrag; Rückerstattungsgesuch - repagopostulo
demande de l'état NT30 – status enquiry – Zustandsabfrage - pridemandado de stato
demande de mutation PS10 – application for transfer – Versetzungsgesuch - peticio pri alioficio; peticio pri dejortranslokigo
demande de secours (traction) PR70 – request for assistance (tractive unit failure) – Anforderung von Hilfe (Zugförderung) - helpopeto (trakcio)
demande de service OD30 – service enquiry – Dienstanfrage - demando serva
demande de transport MA20 – request for transport; transport demand – Verkehrsnachfrage - transportbezono
demande de voie /a-/ (block) PR60 – single-line block system requiring prior line – clear authority – mit Mitwirkung der nachgelegnen Blockstelle - petante pri libertrako (blokinstalaĵo)
demande de voie PR60 – offering of a train; train offering – Anbieten eines Zuges - trajnveturon proponi
demande de wagon VS40 – car order; wagon request – Wagenanforderung; Wagenbestellung - vagonmendo
demande pour émettre NT20 – request to send – Sendeteil einschalten - sendilon ekfunkciigi

Estas evidente ke aperas fenomeno de disbranĉigo de la lingvoj kiu ampleksas precipe problemon de homonimoj kaj sinonimoj. Statistika analizo de la antaŭa kazo plej bone montras la dimensiojn de ĉi-tiu problemo.

- 16 terminoj en la franca (demande kaj kombinoj per sama termino) – 1 baza termino
- nombro da terminoj en la angla – 3 terminoj kiel “enquiry” kaj kombinoj, 3 kiel “claim” kaj kombinoj, 1 kiel “application for transfer”, 5 kiel “request” kaj kombinoj, 1 kiel “transport demand”, 1 kiel “car order”, 1 kiel “offering of a train” kaj “train offering”, 1 kiel “...requiring...” kaj 1 kiel “clear authority” - 9 diversaj bazaj terminoj sed entute 18 unuopaj terminoj (homonimoj kaj sinonimoj)

- diversaj terminoj en la germana – 3 kiel “-aufforderung”, 2 kiel “-antrag”, 2 kiel “Anforderung” kaj kombinoj, 2 kiel “-gesuch”, 1 kiel “-abfrage”, 1 kiel “-anfrage”, 1 kiel “Verkehrsnachfrage”, 1 kiel “...Mitwirkung...”, 1 kiel “Anbieten...”, 1 kiel “Wagenbestellung” kaj 1 kiel “Sendteil...” – 11 diversaj bazaj terminoj sed 16 unuopaj terminoj
- diversaj terminoj en Esperanto – 3 kiel “-postulo...”, 2 kiel “peticio...”, 1 kiel “přidemando”, 1 kiel “demando”, 1 kiel “helpopeto...”, 1 kiel “transportbezono”, 1 kiel “petante...”, 1 kiel “...proponi”, 1 kiel “vagonmendo” kaj 1 kiel “sendilon...” – 10 diversaj terminoj sed 13 unuopaj terminoj

Grava problemo de precizeco kaj klareco de Esperanto kaj aliaj lingvoj estas aperigo de diversaj terminoj por samaj signifoj kaj inverse. Sekvas ekzemploj franca - Esperanto: action en restitution d'un trop-perçu VS20 – repagopostulo pro tropago, paquet d'appel OD30 – interligpostulo, perception supplémentaire – postulo kroma; enkasigo suplementa, rejet NT30 – ripetpostulo, (sed teknika termino «rejet de trame» NT30 estas «malakcepto de bloko» kaj «rejet protecteur» estas «rejeto protekta»), réseau requérant FI20 – fervojo postulanta, revendication (d'itinéraire, de tarif...) MA10 – postulo de ekspedanto (itineraro, tarifaro...). Terminoj «bezono» ankaŭ aperas en kelkaj kazoj en franca lingvo kiel: besoins en matière de transport(s), besoins en transport kaj besoins en transports MA10 sed samaj kombinoj de terminoj aperas en kvar kazoj en angla, germana (tri terminoj) kaj en Esperanto: traffic requirements – Transportbedarf; Transportnachfrage; Verkehrsanforderungen; Verkehrsbedürfnisse – transportbezono.

En la franca lingvo la vorto «demande» havas pliajn signifojn kaj problemojn kun tradukado. Kiel estas videbla ekestis siaspeca disbranĉigo de signifoj el sama vorto kun aldonaj adjektivoj, verboj kaj adverboj. Estas necese pliprecizigi la nociojn en Esperanto. Speciale en cirkonstancoj kiam vorto «postulo» (en)havas diversajn signifojn (ekonomiajn, politikajn, sociajn, teknikajn, ktp.) Pro tio ekestis propono por anstataŭigi terminon «postulo» (ankaŭ ekzistas en IKEV) kiel nocio ligita kun kvanto da varoj kaj servoj en merkato, per itala vorto «domando» (unu voĉo kaj litero diferencigas ĝin de esperanta vorto «demando») kiu devas havi nur unu signifon (vidu cititan artikolon en du numeroj de «La Merkato» (LM) - revuo de Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo - IKEF).

2) Kun termino «oferto» ne ekzistas tiel intensa disbranĉigo sed problemoj tamen estas. Baza termino kaj unika signifo en FT: offre de transport MA30 – transport offer; transport supply – Transportangebot; Verkehrsangebot – transportoferto. Ekzistas ankoraŭ kelkaj kombinoj de terminoj per vorto “oferto” kiel estas: service transféré MA30 – transportoferto anstataŭa, siège offert MA30 – sidlokoj ofertitaj, substitution de service MA30 – substituo de priservada oferta, tonne offerte MA30 tuno ofertita, tonne-kilomètre offerte MA30 – tunokilometro ofertita. Ankaŭ ekzistas neekonomiaj terminoj kun ĉi-tiu elemento de termino (ekzemple franca “offre”) kiel estas surface offerte au flux AT10 (fiziko) – fluksfenestro.

En IKEV ekzistas termino “propono” kiel nocio ligita kun kvanto da varoj kaj servoj en merkato kaj termino “oferto” se tio oni ofertas en formo de skriba dokumento (letero, anonco). En angla lingvo al termino “propono” respondas “supply” kaj al “oferto” kiel signifo el IKEV respondas termino “offer”. Estas bone por menciigi en germana lingvo prezentatajn adjektivojn “transport...” kaj “verkehrs...” kiuj estas necesaj por diferencigi (partojn de) terminoj “transporta” (por uzado de superstrukturaj kapacitoj en transportado de pasaĝeroj kaj varoj) kaj “trafika” (por uzado de superstrukturaj kaj infrastrukturaĵaj kapacitoj). Pro tio ekestis propono por anstataŭigo de termino “propono” per franca “offre” al esperanta termino “ofro” (vid LM). Terminoj “oferto” laŭ IKEV en tiu kazo restas por unuspeca signifo kiel estas jam klarigita. Rekomendinde estas bone kombini adjektivojn “transporta” kaj “trafika” kun “ofro” kaj “oferto”.

3) Terminoj «kostoj» estas tre ofte unika kaj sola por kazoj kiuj ekzistas en FT por tiu signifo. Dua termino «elspezoj» ekzistas en FT en du kazoj – elspezkontrolo PC20 - contrôle des engagements de dépenses kaj elspezoj deŝorvojaĝoj PS70 - frais de déplacement. Esperantaj terminoj kiuj aperadas en kunteksto kun apliko de nuancoj de franca termino «frais» estas «takso» kaj «prezo». Vidu, «frais d'enregistrement MA10 – takso pri (eksped)registrado, frais de douane MA30 – dogantakso, frais de location (wagon) MA30 – luprezado (varvagono), ktp. Kiel komuna signifo de prezo, takso kaj siaspecaj kostoj estas termino «frajto». Frajto (vartrafiko) sub MA30 estas taxe, prix de transport, taxe de transport, frais de transport (marchandises). Tiuj estas faktoj pri esperanta disbranĉigo de signifoj pri «kostoj».

El franca lingvo en FT estas ekzistantaj terminoj: «charges» (oni devas diferencigi de termino «charge»), «coût-/s», «dépenses» kaj «frais», el angla «cost-/s», «charges», «expenditure» kaj «expenses» kaj el germana «Aufwand», «Aufwendungen», «Ausgaben», «Kosten» kaj «Lasten». Multfoje ĉi-tiuj terminoj aperadas kiel sinonimoj, sed en pli precizan uzadon tio povas esti bona rimedo por diferencigo de nocioj. Germanaj terminoj «Kosten» kaj «Ausgaben» en FT uziĝas ofte kiel sinonimoj, sed havas tamen diferencon. «Kosten» havas saman signifon kiel «kostoj», sed «Ausgabe» respondas al esperanta termino «elspezoj» (aus = el, sed verbo «geben» ne signifas senpere kostoj). En kroata lingvo, ankaŭ en serba, ekzistas termino «izdatak», respondanta al esperanta «elspezoj» kaj germana «Ausgabe», kiu konsistas el du vortoj (propozicio iz = el = aus kaj verbo kiel infinitivo «dati» = doni = geben/gabe-n, «datak» en kroata estas kiel substantiva formo). Ne estas bezonata miksi terminoj kun aliaj, kaj kun adjektivoj el unu lingvo vortojn en aliaj lingvoj. Ekzemple: coût RW 10 – cost; price – Herstellungskosten; Kosten; Kostenaufwand; Selbstkosten – produktadkostoj (sed aperas ankaŭ sub termino prix de revient). El ekzemplo tiusence klare estas videbla mikso de du diversaj, sed kelkfoje similaj terminoj kiel «cost» kaj «price», eĉ kvar terminoj en germana, kaj finfine franca termino ne estas limigita al produktado (germana kaj esperanta termino). Estas grave bone kaj pli regule uzadi terminojn kaj oficiale priskribi necesajn detalojn.

En kroata kaj ankaŭ en serba ekzistas termino «troškovi» kiu respondas al «kostoj», sed termino «rashodi» havas pli larĝan signifon. En Esperanto tiusenca termino ne ekzistas, sed estas necesa. En FT ekzistas ekspluatkostoj (operating expenses – Betriebsaufwand; -ausgaben; -kosten; -lasten – charges d'exploitation; coût d'-; dépenses d'-; frais d'-) kiu nomiĝas en kroata librotenada sistemo «poslovni rashodi». Ekzistas ankaŭ «financijski rashodi» kaj «izvanredni rashodi» (financial expenditure kaj extraordinary -, esperantlingve estas nepreciza traduko financaj kostoj kaj eksterordinaraj kostoj). Ankoraŭ ekzistas aliaj ekzemploj.

4) Unu el la plej kontesteblaj vortoj en Esperanto estas «enspezo». Ĝi devenas el itala vorto «spesa» kiu signifas «kosto». Per propozicio «en» ekestis E-termino «enspezo». En kroata lingvo termino «trošak» estas «kosto». Termino «utrošak» konsistas el propozicio «u» kaj substantivo «trošak» kaj oni ŝajnigas ke «enspezo» estas laŭvorta samsignifo. Sed en kroata lingvo «utrošak» signifas (for)konsumado (de materialo...). Sub 1992 en IKEV estas anglaj terminoj «proceeds» kaj «return» kiel enspezo. Sub 2016 estas terminoj «profit», «revenue» kaj «income». Sed en ekonomiaj kaj financaj analizoj kaj raportoj oni plej ofte ne miksas «profito» kun «revenue» kaj «income». En franca lingvo ankaŭ ekzistas termino «revenu». Ĉi-tiuj lastaj terminoj signifas «enspezo». Pli bone estas «enspezo» anstataŭigi per «revenu» en Esperanto laŭ lingva konsekvenco pli regula kaj pli preciza (proponita en citita artikolo).

El FT ekzistantaj kvarlingvaj signifoj de angla lingvo por esperanta «enspezo» estas ankaŭ nekonskvencaj, kiel sekvas por simplaj kaj kunmetitaj terminoj (el vortaroj 1. kaj 2.):

income PC30 – Ertrag – produits – enspezoj; profito (librotenado)
 revenue PC30 – Ertrag – produits – enspezoj; profito (librotenado)
 revenue FI 20 – Einnahmen; Erträge – recettes – enspezoj
 receipts FI20 – Einnahmen; Ertäge – recettes – enspezoj
 revenue audit PC20 – Einnahmenprüfung – contrôle des recettes - enspezkontrolado
 revenue-earning traffic MA10 – Sendung mit Frachtberechnung – transport payant;
 transport taxé – transporto je pagenda frajto
 revenue tonne-kilometre MA30 – Tariftonnenkilometer – tonne-kilomètre taxée –
 tunokilometro tarifita
 revenue from operations FI20 – Betriebserträge; -einnahmen – recettes d'exploitation –
 ekspluatenspezoj

Estas erare intermiksi terminojn pri enspezoj kaj profito. Profito estas diferenco inter enspezoj kaj kostoj. En FT sub termino profito (librotenado) estas franca termino «produits» kaj inverse. Termino «perdo» kiel memstara ne ekzistas, sed aperas perdofteco OD30 – taux de perte (tio estas indikilo pri perdoj, ne rekte financa monsumo). Pli bone estas enkonduki terminon «malprofito». Nome, ekzistas perdoj en multaj aspektoj de la vivo. En FT oni mencias nur terminon perdoj en transportlineo (elektra energio) AT20 – perte(s) en ligne (transport de l'énergie électrique). Estas necesa pli

granda diferencigo en Esperanto inter terminoj kaj enkonduko de novaj. Interalie, same kiel en kazo de kostoj – oni devas enkonduki novajn terminojn por financaj kaj eksterord(inar)aj enspezoj (revenueoj) – propono: «financa revenuo» kaj «eksterorda revenuo». Terminoj chiffre des affaires (franca) turnover (angla) kaj Umsatz (germana) kiujn tre ofte uzadas financa statistiko de UIC kaj aliaj koncernaj organizoj ne estas en FT. Finfine estas bone daŭrigi kun kompara analizo kaj proponi novajn solvojn.

5) Sub cifero 2483 en IKEV estas terminoj subsidy; grant; grant-in-aid (angla) – subvencio (Esperanto). En multaj lingvoj tiu termino estas tre ofte uzata, sed nacilingve specifa kiel en germana Beihilfe. En ĝeneralaj esperantaj vortaroj termino «subvencio» ekzistas, sed ne en FT en eksplicita formo. Subvencio enhavas la plej larĝan signifon (inkludas sumojn en kaj ekster enspezoj, kiuj servas por kuranta negocado kaj por investoj surbaze de senrevenaj rimedoj). En FT ekzistas termino subsidised rate MA30 – Unterstutzungstarif – tarif de soutien – tarifo subvencia. Tio signifas ke ne ekzistas direkta termino por monsumo kiun ricevas (fervojoj) entreprenoj de flanko de ŝtato aŭ aliaj institucioj. Estas interesaj du nedirektaj terminoj: damaĝkompensado eksterarifita PS30 – indemnité compensatrice autre que tarifaire kaj damaĝkompensado laŭarifita PS30 – indemnité compensatrice tarifaire. Tria termino sumo kompensa VS20 – indemnité (dédommagament) – angle compensation (financiale) kaj germane Ausgleichschädigung kaj Ausgleichszulage estas pli direkta ĉar evidente rilatas al absoluta nivelo de subvencioj – monsumo. Franca termino dotation de renouvellement FII0 – pago al renoviga fonduso (Esperanto) kiel rezervoj formitaj el profito ne rilatas al subvencio. Sed en esperantaj vortaroj dotacio estas samsignifa termino kiel subvencio. Aliaj terminoj ligitaj kun kompensado rilatas al diversaj signifoj. En financa statistiko de UIC aperas terminoj «contribution...» (franca), «Zahlungen ..» (germana) kaj «support...». En FT ne ekzistas tre ofte uzata ekonomia termino «support» (angla kaj franca), sed sub «support» kaj multaj modifoj (franca) ekzistas nur teknikaj terminoj. Ne enirante en pluaj diskutoj, oni devas (re)aranĝi ĉi-tiun parton de la ekonomia terminologio.

6) En Esperanto ekzistas granda problemo kun multaj anglaj vortoj kiuj nun estas parto de oficiala aŭ faka kaj scienca lingvo. Ekzemple en FT ekzistas termino bench mark OD30 kaj BT45 – Festpunkt; Gleissicherungspunkt – point bon – mezurpunkto fiksa (trako). Ankoraŭ ekzistas «bench test». Sed en moderna ekonomio kaj ekonomiko ekzistas termino «benchmarking» kiu rilatas al komparaj esploroj inter entreprenoj en celo kiel eluzi spertojn de la plej bonaj en merkato, en produktado ktp. En kadro de UIC oni komencis per demando «Benchmarking Questionnaire» esplori fincan pozicion de fervojaj entreprenoj. Estas necese aprobi tiun terminon en FT. Terminoj «management» ne ekzistas en vortaro sed en aldono de vortaro - Abréviation et signes typographiques oni mencias ĝin. Sed en esperanta klarigo de signoj ekzistas terminoj «afergvidanta estrado» kaj «organizo». Unua termino estas pli mallarĝa, sed dua termino estas pli larĝa ol «management». Ekzemple, en IKEV termino «management» ekzistas kiel «direkcio» (sendube pli mallarĝa signifo ol necesa).

Ĝis nun, krom unuparte «management», oni ne tradukas nacilingve ĉi-tiujn terminojn. En FT ankaŭ ne ekzistas termino marketing sub terminoj en vortaro, sed oni mencias ekzemple en franca Abréviation... termino marketing sub signo MA20. Sed en esperanta Klarigo... ĝi ekzistas kiel merkatumado. Tiujn problemojn oni devas solvi konsekvece en ĉiuj (fakaj) vortaroj.

Fina komento

En la artikolo estas prezentataj la gravaj problemoj de ekonomia terminologio kiuj aperas en FT de UIC. Sendube, tio ne ampleksas ĉiujn problemojn de terminologio en ĉi-tiuj kampoj, sed ĝi indikas al direktoj de proponitaj aŭ estontaj solvoj. Lingva analizo estas rimedo por difini precizan signifon aŭ konkludi kio estas diskutenda. Por faklaboro en kadro de Faka Komisiono de IFEF estas tre grave scii kiel fari Esperanton pli bona en apliko kaj igi ĝin sukcesa en diversaj kampoj de aktivecoj – statistiko, financoj, internacia kunlaboro, ktp. Oni ne povas neglekti influojn de homonimoj en Esperanto, kvankam ili en aliaj lingvoj en multaj kazoj ekzistas en pli ampleksaj formoj. Ankaŭ sinonimoj estas problemo, sed pli malgranda ol homonimoj, eĉ aliflanke oni ebligas novan ŝancon por nuancado de ekzistantaj terminoj. Neviteblaj estas neologismoj ĉar multaj terminoj ekzistas en nesufiĉe precizaj kaj nediferencigaj formoj. Angla lingvo kun en multaj kazoj netradukitaj aŭ momente netradukeblaj terminoj estas speciala problemo. Unuetempe oni devas aprobi anglajn terminojn, sed poste oni povas sekvi logikon de solvoj en aliaj lingvoj se tiaj aperos. Kritika kompara analizo de lingvoj (Esperanto kaj aliaj) estas grava por problemo de signifoj.

LITERATURO:

1. UIC Railway Dictionary, Fervoja Terminaro, Esperanto-Français Français-Esperanto, Internacia Fervoja Unio, I.F.E.F. Terminara komisiono, Budapeŝt, 1997
2. UIC Railway Dictionary, Hungarian-English-German-French, Union Internationale des Chemins de fer, UIC RailLex, MAV Rt., Budapeŝt – Frankfurt - Paris, 1997
3. International Business Dictionary in nine languages – Internacia Komerca-Ekonomika Vortaro en naŭ lingvoj, Kluwer Deventer – Antwerpen 1975
4. Hinŝt, Z.: Rimarkoj pri la libro – Lingva analizo kaj proponoj pri la «International Business Dictionary in nine languages – Internacia komerca-ekonomika vortaro en naŭ lingvoj», La Merkato, n-ro 86 (oktobro 2004), p. 12-16 kaj n-ro 87 (januaro 2005), p. 7-12

Traktato kaj prelego dum la 57-a Kongreso de Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEF) okazinta inter la 7a kaj 14a de majo 2005 en Braŝov (Rumanio).
